# nia voĉo

**madrida esperanto-liceo januaro 2024**

## PREZENTADO KAJ NOVA KURSO DE ESPERANTO

Ni rememorigas ke ni planas novan kurson de Esperanto en la sidejo en januaro. Ĝis nun ne estis multaj sinanoncoj, do ni petas vian helpon por diskonigi inter interesatoj. La kurso estas celata al komencantoj kaj disvolviĝos la sabatojn inter la 11a kaj la 13a horoj matene.

La prezentado kaj unua leciono estas programita por la 13-a de januaro. Informojn petu al: madrid@esperanto.es, kaj bv. diskonigi al viaj konatoj kaj amikoj.

## ZAMENHOFA TAGO INTER PRELEGOJ KAJ LUDOJ

En 2023 la Zamenhofa Tago de la madrida regiono okazis en la sidejo de Fuenlabrada Esperanto-Ligo, la sabaton 16an de decembro, ekde la 11a horo. Kunvenis 20 homoj el urboj Fuenlabrado, Madrido kaj aliaj. Dum la mateno okazis kvar prelegoj pri diversaj temoj: egiptologio, ŝako, filipinaj lingvoj, homaj rajtoj. Post la komuna tagmanĝo en proksima restoracio, ni revenis en la sidejon kaj pasigis du pliajn horojn per tabloludoj.

Por la okazo ni fiksis grandan Esperanto-flagon ĉe la strata pordo de la sidejo.






## POEMOJ PRI PALESTINO

La vendredon 22an de decembro, Jorge Camacho prezentis novan eldonon de sia poemaro “Palestina estrangulada” (versio plejparte hispanlingva de “Palestino strangolata”), lanĉitan de la eldonejo Cantarabia.

La agado okazis en la librejo Sin Tarima, de Madrido, kaj ĝin ĉeestis ankaŭ la intelektulo Santiago Alba Rico, verkinto de la enkonduko.




## NOVA ELDONO DE LA SCIENCA KALENDARO

La Scienca Kalendaro de la hispana Supera Konsilio por Scienca Esplorado (CSIC) denove havos esperantan version en la jaro 2024. Memoru ke temas pri kalendaro kiu ĉiun tagon de la jaro memorigas eventon aŭ sciencisto, kun aparta atento al diverseco.

En la momento de eldonado de tiu ĉi bulteno oni ankoraŭ ne publikigis ĝin; ni esperas oficialan anoncon en la dua semajno de januaro. Vi tiam povos ĝin trovi en la retadreso https://digital.csic.es/handle/10261/341368.

La kalendaro havas ankaŭ tŭiteran konton, kiu ĉiutage informas pri la koncerna datreveno, en la adreso: https://twitter.com/scikalendaro.

## (RE)ALIĜU AL MADRIDA ESPERANTO-LICEO

Januaro estas ja bona momento por aliĝi al Madrida Esperanto-Liceo, la loka esperantista klubo en Madrido. Se vi jam estas ano, ne forgesu pagi vian kotizon, ĉu en la sidejo ĉu en la konto de MEL: banko ARQUIA BANCA, numero de konto: ES55 3183 2800 1310 0655 7423.

Se vi ankoraŭ ne estas ano, memoru ke la kotizo estas nur 12€ jare. Plenigu la formularon troveblan en fako "Dokumentoj" de la retejo https://www.esperanto.es/mel/, aŭ simple kontaktu kun Liceo en la kutima adreso: madrid@esperanto.es.

Dum venontaj semajnoj okazos la Ĝenerala Kunveno de la grupo. Atentu la kunvokon en via kutima adreso.

## 2024, JARO DE TUTMONDAJ KONGRESOJ

En tiu ĉi jaro la vizitantoj de renkontiĝoj internaciaj havos ĉiujn eblojn ĉeesti kongresojn en ajna parto de la mondo.

2024 estos la jaro de la unua Universala Kongreso en Afriko. Ĝi okazos en Aruŝo (Tanzanio), proksime al la Kilimanĵaro, plej alta pinto de la kontinento. Ĝi estos unika ŝanco koni areon ne ofte vizitatan el nia lando. La datoj estos de la 3a ĝis la 10a de aŭgusto, kaj eblas trovi pliajn informojn en https://uk.esperanto.net/2024/.

La 80-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos en Eŭropo, konkrete en Šventoji (Litovio), inter la 18-a kaj la 25-a de Aŭgusto 2024. Ĝin organizas la Litova Esperanta Junulara Organizo (LEJO).

La kongreso de ILEI (instruistoj) okazos en Ameriko, konkrete en Maceió (Brazilo), inter la 20a kaj la 27a de julio.

En majo (inter la 8a kaj 12a) okazos antaŭvideble granda renkonto: la Eŭropa Kongreso, en Strasburgo, kiu estos samtempe kongreso de la germanaj kaj francaj asocioj, kune kun la asocio de fervojistoj IFEF kaj la landaj asocioj de Italio, Belgio kaj Svislando.

Eĉ en la iberia duoninsulo estas organizata internacia kongreso: tiu de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) okazos en Porto, en aŭgusto.

Kaj ne forgesu pri la hispana kongreso, kiu disvolviĝos en la valencia regiono, en septembro!

Pri tiuj kaj multaj aliaj renkontoj kaj kunvenoj, vi trovos la detalojn en la retejo https://eventaservo.org/.

## PLIAJ RENKONTOJ KAJ INFORMOJ

La sidejo plu malfermiĝas ĉiulunde, post la 18,30, kiel tradicie, sen aparta programo. Pro la festoj, la unua tago estos la 8a de januaro.

La unuasabata kunveno okazos ne la unuan sabaton, sed la 13an de januaro, je la 18:30, ĉe la polpejo Pulpería O Miño, en la strato Idioma Esperanto, numero 2 (proksime al metro-stacio Alsacia). Memoru ke ĝi estas malferma kaj sendependa de via lingvonivelo.

Por novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En Fejsbuko vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/. En la socia retejo X (antaŭe *Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com